# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**

**PLENUMITA 16/07/2020 Kvarcentokdeksepa eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

***Uzindaj ligoj*** *reta-vortaro* *Freelang Vortaro* *Plena Ilustrita Vortaro* *Duolingo* *Google Translate* *Pasintaj AE eldonoj* *duolingo entute* *lingvohelpilo* *Esperanta Retradio* *Esperanta himno* *PMEGramatiko* *openclipart.*

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## Entute 730,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo

Nun studas **285,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **232,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **213,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun preparas Esperantan programon por francoj. (Ekde julio 2020 ?)


Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde oktobro 2020 ?)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)*



## Gramatika serio "La Verbo en P.A.G." N.ro. 129




Tiu rigida sistemo de Zamenhof , kiu faras la lingvon pli logika kaj perfekta, necesigas sistemon de vortkunmetado, aŭ pli bone de radikkunmetado, por krei pliajn vortojn bezonatajn (kiel faras ankaŭ kelkaj etnaj lingvoj krom la flekcio). Ekzemple "veterprognozo" kaj "patrino" kaj "patrinojn". Zamenhof diris "Kaj la diversaj formoj gramatikaj, la reciprokaj rilatoj inter la vortoj k.t.p. estas esprimataj per la kuniĝo de senŝanĝaj vortoj egale ĉu tiuj estas vortradikoj, prefiksoj, sufiksoj aŭ finaĵoj." Alivorte, por fari novan vorton ni kungluas neŝanĝeblajn radikojn kaj aldonas finaĵo(j)n. Kontraŭe al P.A.G., mi ne faras diferencon inter la kutimaj radikoj kaj la plej multaj afiksoj. Sed mi klasifikas la finaĵojn en specialan klason de radikoj, ĉar ili ne povas uzati en alia parto de la vorto ol la fino, kio limigas ilian uzon.

(daŭrigota). *Marcel Leereveld.*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

# Surhavu vizaĝmaskon.



## Unu terno povas elŝpruci ĝis 8 metroj.

https://twitter.com/i/status/1245591199034929153 Roger Springer



# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas je 10.30 atm ĝis 12tm ĉe la enirejo de Manlia Varfo aŭ ĉe la Bavarian Beer Café, Manlia Varf, ĉiujn unan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.
La 18a de julio estos la tria sabato. Venu. Ni renkontiĝos al la Bavarian Beer Café. Poste ni trovos taŭgan lokon por la kunveno *Roger Springer*

## Estrarkunveno 2020-07-09



Partoprenis: Sandor, Jonathan, Heather, Terry, Indrani, Bradley, Penny, Katja

**(1) ESPERANTO EN MONTESSORI LERNEJOJ EN NOVZELANDO**

Ni daŭrigis la diskuton pri ebla kampanjo en Montessori lernejoj en NZ.

Ni agnoskis kaj admiris la laboron de Penny. Tamen, ni ankoraŭ ne povis konsenti, **kiel** antaŭeniri.

**(2) TAGO DE AZIO KAJ OCEANIO**

Vendrede 26/06 okazis TAO (Tago de Azio kaj Oceanio)

Kelkaj de ni partoprenis.

**(3) REGULAJ MONATAJ ZOOM PREZENTADOJ**

La unua okazos dimanĉon, la 19-an de Julio (inter la 16:00 – 18:00 Sidneja tempo)

La du unuaj prezentantoj estos:

**Paul Peeraerts(Belgio):** Monato 40 jaroj

**Markus Gabor (Hungario):** KOVIM-19 en Hungario

Pli da detaloj en nia retejo

**(4) KIU ESTAS KIU?**

*Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE*

La libro "Kiu estas Kiu" de Katja Steele kaj Charles Stevenson progresas. Katja ŝatas aldoni fotojn de ĉiuj Aŭstralia kongreso aŭ somerkursaro.

**(5) MEET UP EN ADELAJDO – DIMANĈE (12/7)**

**– NASKIĜTAGFESTO POR BOB FELBY**

Bv partopreni tiun kunvenon kaj gratuli Bob Felby

**(6) MEMORIGO PRI LA NUNAJ VIRTUALAJ KUNVENOJ**

La listo de nunaj Esperanto virtualaj kunvenoj en Aŭstralio.

**Brisbano**: Ĉiun duan sabaton, je la 14:00-a **(kontaktu: maquinacionescreativas@gmail.com)**
**Sidenejo**: Sabate, 18:00 -20:00
**Melburno**: Dimanĉe, 19:00 – 19:40 (MeetUp)
**Adelajdo**: Dimanĉe, je 14:00 (Meet Up), (14:30 en Sidnejo, Melburno)
Ĉiun unuan merkredon de la monato, je la 19:00-a (19:30 Sidnejo)

Bv partopreni kaj kontribui.

Se vi scias aŭ eble eĉ mem organizas virtualajn kunvenojn informu nin.

Venonta kunveno: jaŭdo 23-a de julio 2020.

## Gratulon al **BOB FELBY**,pro lia 88a NASKIĜTAGA datreveno







Bonajn dezirojn de Legantoj de AE kaj Roger Springer

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*

# Ĉu viaj tre blankaj dentoj kostas multe ?





**KIU POSEDAS AŬSTRALION ?**

Kiuj posedas la aŭstralianojn?

Post la dua mondmilito mi havadis dentiston kiu antaŭe estis dentisto en la nederlanda armeo. Iam la armeo ordonis siajn dentistojn science ekzameni la efikon de la uzado de dentopasto. La armeo publikigis la rezultojn por si mem kaj por informi la nearmean dentistoorganizon. La trovo de la ekzameno estis, ke la uzo de dentopasto neniel helpas la sanecon de la dentoj kaj ke la uzo eĉ povas esti

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

malutila ĉar la pasto detruas kovraĵan tavolon kiu protektas la sanon de la dentoj. Post la apero de la rezulto unu el la grandaj mondskalaj dentopasto-fabrikistoj informis la armeon, ke se ĝi ree publikigos kritikan artikolon pri la pasto, tiu fabrikisto tiros la armeon al juĝkortumo. Ĉar la pastofabrikisto povas pagi por la plej kleraj juĝistoj, la armeo decidis ne plu fari tiajn ekzamenojn.

Kiam mi aĝis dekunujara, mi komencis uzi dentopaston. Antaŭ tiam nek mi nek mia fratino nek mia patro brosis siajn dentojn. Neniam. Kaj ni neniam bezonis viziti dentiston. Post unu aŭ du jaroj da dentpasta brosado kelkaj el miaj dentoj malboniĝis kaj mi bezonis iri al dentisto. Neniu kompreneble scias la kaŭzon, sed poste en la vivo mi havis similan sperton, renverse. Kaj kiam mi loĝis en Nederlando kaj kiam mi loĝis en Aŭstralio mi devis regule viziti dentiston pro problemoj pri la dentoj. La riparado ante miajn dentojn kostis al mi multe da mono, precipe en Aŭstralio. Kaj dum la tuta tempo, eble okdek jaroj, mi brosis miajn dentojn kun dentopasto.

Sed antaŭ eble dek-kvin jaroj nia ĉevalo mortis, post tridek jaroj da vivo. Li neniam bezonis iri al dentisto. Tuj post la morto mi ekzamenis liajn dentojn, kaj ili aspektis tute sanaj, kvankam iomete grizaj aŭ brunetaj. Mi pensis ĉe mi mem ”Kial li ne bezonis dentiston kaj kial mi bezonas?” Mi do decidis ne plu uzi broson nek paston, sed daŭrigi nur la purigadon per bastoneto inter la dentoj, ĉar estas tie kie restas la restoj de niaj sukeraj kaj acidaj manĝaĵoj. La ĉevaloj ne bezonas fari tion, ĉar ili ne manĝas sukeron nek vinagron. Post mia maldaŭrigo uzi dentpaston, mi ne elspezis unu dolaron por la dentistoj, ĉar mi ne bezonis ilin.

Mi jure rajtas rakonti miajn spertojn, ĉar mi ne menciis la nomon de iu fabrikisto nek ke miaj spertoj asertas ke la pasto kaŭzis miajn dentomalsanojn. *Marcel Leereveld .*

## REĜINO SUBSTANTIVO KAJ REĜO VERBO.

Kiel en ŝako la Reĝino povas moviĝi pli ol la Reĝo, tiel en la gramatiko oni povas krei pli da substantivoj ol da verboj. Oni povas krei “dormo” el la verbo “dormi” sed oni ne povas logike krei “liti” el la substantivo “lito”. Mi povas mencii pli da substantivoj kia “manĝo” (el la verba radiko “manĝ”) ol da verboj kia “saŭci“ (el la substantiva radiko “saŭc”). Ĉe substantivoj ni do devas solvi pli da problemoj pri kion fari pri la verbaj komplementoj ĉe ŝanĝo de verbo al substantivo. Jen la diversaj specoj de komplemento.

1). La adverba epiteto: “rapide manĝi” fariĝas adjektiva epiteto: “la rapida manĝo”, kaj “sanige dormi” fariĝas “saniga dormo”.

2). La suplemento ĉe infinitivo: “manĝi en la ĝardeno” fariĝas la sama suplemento ĉe la substantivo: “la manĝo en la ĝardeno”.

3). La suborda frazo: “ni manĝas, ĉar ni malsatas” restas la sama: “nia manĝo, ĉar ni malsatas”.

4). La adjekto: “Ni manĝas en la ĝardeno” fariĝas adjektiva suplemento: “nia manĝo en la ĝardeno” kaj “Ni manĝas pro malsato” restas la sama en “Nia manĝo pro malsato”.

5). La (rekta) objekto “ni manĝis endivion” fariĝas suplemento kun “de”: “la manĝo de (= ante al) endivio estas valora”, kaj “ni jam mendis la biletojn” al “Nia mendo de la biletoj”.


6). La subjekto “la familio manĝos endivion morgaŭ” fariĝas suplemento kun la prepozicio “de”: “la manĝo de (= ate de) la familio”, kaj “la patro mendos la biletojn” fariĝas

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

"La mendo de (= ate de) la patro". Kaj ankaŭ: "La mendo de (= ate de) la patro de (= ante al) la biletoj".

7). Se la gramatika objekto estas infinitivo, oni kutime, kvankam ne necese, forlasas la prepozicion "de": "Li proponis resti hejme" fariĝas "Lia propono (de) resti hejme". Tio okazas pro la Regulo pri Neceso kaj Sufiĉo. *Marcel Leereveld .*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★



AL MIA PATRINO

HEINRICH HEINE


I.

Mi ne inklinas timi superulojn,
Fiero diktas agi neafekte,
Se eĉ la reĝo min rigardus rekte,
Mi certe ne mallevus la okulojn.

Sed en ĉeesto dolĉa kaj trankvila
De vi, patrino kara, min forlasas
La obstinemo, la fiero pasas,
Kaj min ekregas sento plej humila.

Animo via venkas min mistere.
Animo alta, kiu saĝe, klere
Kun brilo sin eksvingas supertere.

Kaj tamen zorgo premas la memoron,
Ĉu kontraŭvole verŝis mi doloron
En vian, tiel min amantan koron.



II.

Mi iam vin forlasis pasiplene,
Travagi volis mi la tutan teron,
En koro firmtenante la esperon,
La *amon* fine kapti ĉirkaŭprene.

En ĉiu strato serĉis mi la amon,
Ĉe ĉiu domo manon mi etendis,
Almozpetante la rigardojn sendis,
Sed moke oni donis nur malamon.

Kaj vage serĉis mi la amon ĉiam,
Sed amon, amon trovis mi neniam,
Malsana mi revenis kaj sen amo,

Jen *vi* salutis min komprene-varme,
Kaj en okuloj viaj ĝoje-larme
Ekbrilis — la serĉita, dolĉa amo.

El la germana: *Zanoni*

Sendis *Petro Danzer*



★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

AUSTRALIANS FOR WAR POWERS REFORM

La ĉefministro havas la eblecon sole sendi nian militistaron por batali ien en la mondo kaj sen konsulto kun la parlamento
https://warpowersreform.org.au/

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

25,499,884 Australianoj

1,439,323,776 Ĉinoj Junio 21, 2020, laŭ la nuna UN statistiko.






***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

**Ne mordu la manon, kiu nutras vin** Kritiko de Ĉinujo ne helpas iujn ajn en Ĉinujo kaj ne helpas Aŭstralion sed perdigas al Aŭstralio bilionojn da dolaroj per perdo de turistoj, studentoj, merkato pri viando, hordeo, karbo, ktp *Roger Springer*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

Nun Aŭstralio kaj aliaj landoj aĉetos pli da armiloj. Tio ŝajne ne estas saĝa decido. Pacemaj agoj pli instigas pacon ol minacoj.
Ĉu la mondo ne havas sufiĉajn problemojn sen la uzo de mono por la tria mondmilito ? *Roger Springer*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## 26-a de julio - Esperanto-Tago, tago de lingva justeco.




Post la viruso la mondo bezonas pacon, reciprokan respekton kaj kunlaboron,ne militon kaj perforton!
Lernu Esperanton, la mondan lingvon
por kunlaborado kaj paco!
- esperanta | eo | Esperanto (La Internacia Lingvo) -
Internacia Lingvo Stefano
Informis AE *Petro Danzer*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## "VIVU E.S.K. KAJ A.E. !

Nun ke E.S.K. fariĝis tre interesa kaj tre bonvena Turisma Gazeto por Esperantistoj (*Travelogue Magazine*) (12 paĝoj el 20), la pludaŭro de A.E. estas des pli necesa. (*Marcel*).

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

## AEA (Aŭstralia Esperanto Asocio) invitas vin partopreni

nian unuan monatan prezentadon

**Dimanĉon, la 19-an de julio, je la**
16:00 - Sidnejo, Melburno, Brisbano
15:30 - Adelajdo
15:00 - Tokio, Seulo
07:00 - Londono
08:00 - Parizo, Berlino

**Monato – 40 jaroj**: La historio de la mondfama Esperanta revuo
– Paŭl Peeraerts (Belgio), ĉefredaktoro de *Monato*
**La ĉefaj socioscienca j kialoj kaj efikoj de KOVIM-19, kaj kiel Hungario sukcesis trakti la epidemion**
– D-ro Márkus Gábor (Hungario), ekonomikisto kaj verkisto

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***

Jen la Zoom ligilo por la evento:

https://us02web.zoom.us/j/89739889044?pwd=Qk43dlVqMUlyRHd2SjJaUW5HTXNRQT09
Meeting ID: 897 3988 9044 Password: 828134


Plej amike, Heather, Indrani, Jonathan, Sandor, Terry


★★★★★★★

Karaj esperantistoj,
Dimanĉon, la 12-an de julio, je la 14:00 ni festis la naskiĝtagon de Bob Felby.
per Zoom kunveno. *Sandor HORVATH*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★


Kiel granda adoranto de **L. TOLSTOI** ĉiam interesa min lia opinio. La 1909 eldono de " La Revuo" mencias lin :


**Tolstoj restas fidela al Esperanto.** — Laŭ la londona ĵurnalo « Concord » li denove certigis sian fidon pri nia movado respondante al unu el siaj korespondantoj : « Antaŭ 15 jaroj mi esprimis mian simpation por Esperanto. Mi eĉ projektis publikigi ĵurnalon en tiu ĉi lingvo. Hodiaŭ mi havas la saman opinion, kiel antaŭe. »


**Diverslandaj Notindaĵoj.** — **Belgujo.** — La Antverpena Urbestraro tre gratulinde decidis eldonigi priantverpenan gvidlibron, kiu represigos plej belajn fotografaĵojn el la urba kolekto. Ĝi estos disdonata en Washington kaj bonege instigos la nunajn Kongresanojn fariĝi kongresontoj en 1911. — **Francujo.** — Fondiĝo de novaj grupoj en *Rive-de-Gier* kaj *Vichy*, la fama banloko. — **Germanujo.** — Rimarkindan intereson montras la gazetaro pri la ĵusa enkonduko de Esperanto en la popolajn lernejojn. Fondiĝo de « Grupo Esperanto-Ruĝa-Kruco » en Dresdeno, de « Laborista

*Petro Danzer*






★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★



**Gough Whitlam** Aŭstralio mallonge fariĝis sendependa ŝtato dum la Whitlam-jaroj, 1972-75. Usona komentisto skribis, ke neniu lando "inversigis sian postenon en internaciaj aferoj tiel plene sen kaŭzi hejman revolucion".
La registaro de Whitlam finiĝis pro la kolonia servileco de sia nacio.
Li aboliciis reĝan patronecon, movis Aŭstralion al la Ne Aliancianta Movado, subtenis "zonojn de paco" kaj kontraŭis provojn pri nukleaj armiloj. **Gough Whitlam** revenigis niajn soldatojn el Vietnamio kaj kritikis la *Pine Gap* Usonan militbazon en la mezo de Aŭstralio kaj li pagis la prezon.
https://www.theguardian.com/commentisfree/2014/oct/23/gough-whitlam-1975-coup-ended-australian-independence *Roger Springer*

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★



**3ZZZ** Por tiuj, kiuj mistrafis la eventon de la 7a de junio, organizita de AEA , la elsendo de la 13a de julio donas oportunon aŭskulti la prelegon de Katja Steele pri Doris Teller . Ĝi ankaŭ pensigas pri la graveco uzi fundamentajn vortojn kaj la blogo de Viktoro Sole kiel kutime amuzos la aŭskultantojn *FranciskaToubale*

***Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE***